

# *Ora Ĵurnalo*

Numero 33, Oktobro 2020



Magazino por kulturo kaj plezuro

*Bonvolu viziti nian retpaĝon:*

**[www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org)**

# Enhavo

Enhavo .....	2	Thomas MANN (1875–1955).....	19
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	Blanka pigo ĉe Säggengatan, Hisingen.....	19
Espeporko meditas.....	3	Jan Hellström donas al ni novan naturpromenon .....	20
La nuna edukejo por la martrafiko.....	4	Pri la gazeto "Faktum" .....	21
Pri la "korona distanco" .....	4	Pri krimoj kaj prizonoj en Svedio .....	21
Atendante pli normalajn tempojn ni legu!.....	5	Punoj por esperantistoj .....	22
Urba promeno en Gotenburgo .....	5	La ekstrema pruvo de matureco .....	23
La urba promeno en Gotenburgo .....	6	Stokholmo havas restoracion kun esperanta nomo .....	24
La urbo de elmigrintoj, Göteborg .....	11	Esperantaj vortoj en la komerca mondo .....	25
Esperanto sur la strando en Pollando estis celebrita ankaŭ en 2020 .....	12	Horoskopo – la nunaj datumoj ne estas la ĝustaj.....	26
Ĉu indas prepari aranĝon dum la epidemia? .....	14	Pri nova planedo kiu ĉirkaŭas la stelon Aniaro .....	28
Novaĵoj el Gdansko .....	14	Ni en Skandinavio de Willy Breinholst.....	29
Jönköping – Daniel Viberg informas pri sia hejmurbo .....	15	Esperantaj historietoj.....	31
ILEI.se – raporto pri tritaga kurso en Mullsjö .....	16	El la retpaĝo de Núbia Alves Sobral .....	32
JOHN BAUER, svedo, kiu pentris la etoson de la magiaj arbaroj .....	18	Kanto kun teksto en tri lingvoj .....	32
		"Knabineto kun alumetoj" .....	33

## Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, [siv.burell@gmail.com](mailto:siv.burell@gmail.com) kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, [ingegerd.granat@telia.com](mailto:ingegerd.granat@telia.com). Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, [arendsian@hotmail.com](mailto:arendsian@hotmail.com).

Kontaktu iun el la redaktantoj kiam vi volas viziti la bibliotekon, ili malfermos al vi!





## Espeporko meditas



- ☆ Finfine la gotenburganoj denove povis havi realan kunvenon, sed ekstere. Ingegerd invitis al urba promeno en la centro de Gotenburgo. La tekston vi havas en ĉi tiu numero kaj vi povas mem fari la historian promenon. La 17an de oktobro estos la sekvanta promeno en Hisingen. Bv. rigardi nian retpaĝon [www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org).
- ☆ Ankaŭ en Gdansko oni reprenis la aktivecon, ekz. "Esperanto sur la strando". Krom Gdansko, Sopot kaj Gdynia nova urbeto estis envolvita – Poplin, 50 km for de Gdansko.
- ☆ Daniel, unu el niaj membroj, loĝas en Jönköping. Iam estis esperanto-klubo en tiu urbo. Daniel volas restarti la klubon, sed li bezonas kunlaborantojn. Kelkaj paĝoj temas pri Jönköping – kaj iomete pri proksima vilaĝo, Mullsjö.
- ☆ Nova tipo de krimo en Gotenburgo okazas inter klanoj. Okazis ke klano baris la vojon al "sia areo" kontrolante ĉiujn, kiuj sidis en aŭtoj. Kion la krimstatistiko diras al ni? Legu!
- ☆ La Nobel-premio pri fiziko en 2020 premias teorion kaj observon de "nigra truoj" meze en la Lakta Vojo. Roger Nilsson, Gotenburgo, ankaŭ traktas la

spacon en siaj artikoloj. Horoskopoj estas popularaj kaj troviĝas en multaj magazinoj. Roger sciigas nin pri "la veraj zodiakaj periodoj". La simboloj estas: Ŝafo, Taŭro, Ĝemeloj, Kankro, Leono, Virgo, Pesilo, Skorpio, Sagitario, Kaprikorno, Amforo, Fiŝoj. Se vi ĝis nun rigardis vin kiel Skorpion, vi poste pensos ke vi estas Pesilo. Krome troviĝas la **Serpentportanto!**

- ☆ Celebrindaj tagoj – 26/9: La Eŭropa lingvotago, 28/9: la juda pekliberiga tago – Jom Kippur, 4/10: la tago de cinema bulko, 10/10: la tago de senhejmuloj, 5/10: La Internacia Infantago, 25/10: la somera tempo finiĝas kaj dum semajno 44 la infanoj havas Aŭtunan Libertempon.
- ☆ Ora Ĵurnalo celebros sian naskiĝtagon en novembro, sed la ekzaktan daton mi ne scias. Povas esti la 7an de novembro, kiam Ingegerd havas nomtagon, aŭ la 30an de novembro, kiam Andreas havas nomtagon.

Ora Ĵurnalo volas retgratulojn de niaj legantoj kun koroj kaj floroj! Tiujn ni enmetos en la novembran numeron.

La tempo rapide pasas. En novembro 2017 la unua numero aperis, kaj ankoraŭ Ora Ĵurnalo viglas. / Siv



# La nuna edukejo por la martrafiko

Sur la unua paĝo vi havas bildon pri la iama marista lernejo. Nun la edukado troviĝas aliflanke de la rivero Göta Älv en Lindholmen.

La teknika gimnazio de Lindholmen situas ĉe la enpasejo de Göta Älv. La gimnazio estas najbaro al la markadeta lernejo de Chalmers. Ĝi estas profesia trejnigo alterne teoria kaj praktika. La lernejo estis inaŭgurita en aŭgusto 2020.

Inter diversaj teknikaj edukoj, la lernejo enhavas la martrafikan edukadon. / Siv



Lindholmens tekniska  
gymnasium



## Pri la "korona distanco"



En radia elsendo mi aŭdis ja jenan: Du viroj en Norda Botnio renkontiĝis.

Tie oni parolas nur kiam vere necesas.



"Bone ke la korono-distanco je du metroj nun estas for." – (longa paŭzo) – "Jes bone, nun ni povas reiri al la normala kvinmetra distanco." / Siv



# Atendante pli normalajn tempojn ni legu!



Propono:

Ni legu la saman libron!

Poste ni diskutos ĝin, rete aŭ reale.

Ni komencu per "La mirinda sorĉisto de Oz".

Ĉu bona ideo?

Se jes – anoncu vin al mi: Ingegerd!

073-502 53 32, [ingegerd.granat@gmail.com](mailto:ingegerd.granat@gmail.com)

La libro kostas 20,10 € ĉe UEA sed troviĝas ankaŭ rete:

<http://i-espero.info/files/elibroj/eo%20-%20baum,%20l.frank%20-%20la%20magio%20de%20oz.pdf>



## Urba promeno en Gotenburgo la 19an de septembro

Daniel, Andreas, Nick kaj Filippa.

Ingegerd kun la esperantoflago faris la promenon kaj Lasse – en la mezo – laŭlegis la tekston. Lia voĉo estis bone aŭdebla. Multaj vagantoj preterpasis kaj aŭdis Esperanton – eble por la unua fojo.





Por teni la "korona-distancon" ĉiu havis propran paperon kun la informo pri gotenburgaj entreprenoj.

La nuna posedanto de "Knapp-Carlsson" (Buton-Carlsson) posedas du milionojn da butonoj.



Ni ĝojas renkonti novan paron Nick kaj Filippa, kiuj parolas Esperanton kaj havas spertojn de Usono kaj Islando – kaj nun ili loĝas en Gotenburgo.

Estu bonvenaj! / Siv

## La urba promeno en Gotenburgo

### 1. Pocket Shop

Bonvenon al ĉiuj, bonaj geamikoj. Hodiaŭ estas la tago por fari promenon tra parto de Gotenburgo.

La temo estas komercistaj agadoj en la centro. Ni povos vidi historiajn personojn kiuj troviĝas malantaŭ la agadoj. Ni ne ekscios ĉion sed la promeno havas la intencon vekti intereson pri la Gotenburga historio.

### 2. Ferdinand Lundqvist – NK

Ekloĝbutiko en Gotenburgo, kiu startis la 17:an de majo en 1864. "Östra Hamngatan 42" estas la adreso.





Ferdinand Lundqvist mem naskiĝis en la jaro 1837 kaj mortis en la jaro 1916. La framasona ordeno foje planis havi domon por la ordenaj agadoj ĉi tie. La framasonoj hodiaŭ havas alian adreson.

Poste ni iros preter la framasona domo proksime de "Gustaf II Adolfs Torg". Ni tiam rimarkos la domon.



#### 4. Meethz

Carl Herman Christopher Meethz vivis en la jaroj 1835–1889 kaj evoluigis grandmagazenojn speciale por virinaj vestoj. La "admirala ŝipo" situis en Kungsgatan 37–39 en Gotenburgo. La granda reputacio de tempo kun Meethz estas la granda teoĉambro, kie "Madame Yvette" ludis violonon dum 25 jaroj.

En la proksimeco la kafejo "Mekka" troviĝis kun malluma medio, ruĝaj sofoj kaj bongustaj tortetoj.

#### 5. Peter Wieselgren

Peter Wieselgren n. 1/10 1800 en Smolando, m. 10/10 1877 en Gotenburgo.

Peter Wieselgren estis kontraŭalkohola kaj probatalanta pastoro. Literaturisto kaj historiisto kaj agis en Gotenburgo.

Ferdinand Lundqvist vendis sian entreprenon la jaron 1967 al "NK – Nordiska Kompaniet".

La domo nun estas alikonstruita kaj pli granda.

Foje mi laboris du semajnojn en la dekoracifako de "NK" kaj mi laboris interne de ekspoziciaj fenestroj kun oraj kristarboj. Mi povis vidi la homojn, kiuj iris sur "Östra Hamngatan".

#### 3. Bräutigams

La kukvendejo de Bräutigam ĉe "Östra Hamngatan" estas familia entrepreno fondita en la jaro 1870 de Emil Bräutigam el Thüringen, Germanio. La filo Carl, transprenis la prosperan kafejon en 1905. Li enkondukis la torteton de la Reĝo Gustavo II Adolfo. La torteto memorigas nin pri lia morto ĉe Lützen. La torteto kun reĝa kapo de ĉokolado estas forta tradicio en Gotenburgo.



Lia propra nomo estis Pehr sed la pastoro erare aŭdis kiam li baptis lin. Tial la nomo estas Peter. Kiam li havis 10 jarojn li legis la tutan Bibliion. Dum la komenco de la 19:a jarcento ĉiu homo drinkis averaĝe 45 litrojn jare. Komparu kun 1990, kiam estis 5 litrojn jare. Peter Wieselgren estis grava sobrega pastoro dum sia vivo kaj nun li staras ekster

la Gotenburga Katedralo kaj gardas la urban  
sobrecon.

Nun ni iros en la katedralon kaj ĝuos la  
belecon.

## 6. John Hall kaj la urba brulado en 1802

Alia okazo estis la urba brulado en 1802. La 20:an de  
decembro la homoj en Gotenburgo vekigis per  
kanonpafo. La katedralo kaj la domoj ĉirkaŭe brulis.  
Grandaj ruinigoj!

La posedanto de Gunnebo, John Hall la pli maljuna,  
mortkuŝis en la katedralo kiam la flamoj de la granda  
brulego forbruligis la katedralon.

Estas imagebla, ke li estas la unua persono kiu estis  
kremaciita en Gotenburgo. Lia filo, John Hall la plijuna,  
forbrulis en Stokholmo kuŝanta sur bakforno dum  
malvarma vintronoko, tute senrimeda.



Sed, "Gunnebo Slott" estas ne forbrulita kaj meritas  
viziton!



*Domkyrkan*

## 7. Buttericks

En la jaro 1913 la firmao Buttericks malfermis la  
pordojn en Gotenburgo.

Multe da ŝercoj okazis kun helpo de ŝercaĵoj de  
tiu vendejo.

Kiu ne sidis sur furzkuseno de Buttericks? Kaj se vi  
volas esti persono de la 18:a jarcento vi povas  
aĉeti perukon por aspekti kiel Bellman aŭ Linné.

Multe da ŝercaĵoj, kaj ĝojaj vestoj troviĝas.





## 8. "Knapp Karlsson" aŭ "Butona Karlsson"

Estas merceraĵa vendejo, kiu startis en la jaro 1910.

Albert Karlsson, vendisto en la butiko "Gillblads" revis pri propra entrepreno.

Malgranda butiko kiu enhavis butonojn, pinglojn kaj fadenbobenojn k.t.p. sur "Korsgatan" transformiĝis al speciala butiko por butonoj. La firmao havas pli ol cent jarojn kaj nun estas la adreso "Kyrkogatan 34". La nova posedanto post 1992 estas la Liberala virino Ann-Catrin Fogelgren kiu nun estas posedantino de du milionoj da butonoj.



## 9. Arkaden

Tiam kaj nun:



## 10. "Ostindiska Kompaniet"

La hodiaŭa urba muzeo!

SOIC fondiĝis en la jaro 1731 kaj la komercistaj aferoj gajnis multe da mono en la komenco. La startiga pafo okazis en 1727 kiam la skota viro Colin Campbell kaj la Gotenburga Niclas Sahlgren kaj aliaj planis la grandan kompanion en Ostende. Vojaĝoj al Ĉinio kaj Hindio donis multe da ekzotikaj komercaĵoj. Kelkfoje la ŝipoj pereis kaj kelkfoje la ŝipoj reiris kaj portis grandajn trezorojn al Gotenburgo.

## 11. Brogyllen

Kun vidaĵo super la kanalo oni malfermis la kafejon en la jaro 1996.

Poste ni povas ĝui kafon, tortetojn kaj freŝajn salatojn. Vera Viena kafejo.



Eble ni povas vidi la komerciston Bernt Harder Santeson kiu vivis ĉi tie en la jaro 1923, la granda ekspozicia jaro de Gotenburgo.

Li ne povas rezisti la bonan odoron de kafe!

Bonan dankon pro via atento! /Ingegerd

*Aldono de Siv:*

Ingegerd fotis min ĉe la eniro de Ströms, butikoj kun vestoj kaj por viroj kaj por virinoj. Kial la foto?

Nu, mi rakontis al Ingegerd, ke en la komenco de la 1970-a jardeko mi laboris en la laborperado de Gotenburgo. Se mi ĝuste memoras, la posedanto volis malestabliti la entreprenon. Mi iris al la butikoj por fari raporton pri la kondiĉoj kaj meritoj de la dungitoj kaj pri la ebleco por ĉiu havi novan laboron. Tamen tri el la dungitoj transprenis la funkciadon de la entrepreno kaj poste neniu bezonis helpon de nia oficejo.



# La urbo de elmigrintoj, Göteborg

– de "Sillgatan" al "Postgatan"

Svedio estis malriĉa lando dum la centjarŝanĝo 1900. Multaj malsatis kaj la sociaj diferencoj estis grandaj. Multaj revis pri pli bona vivo sed por multaj estis nur revoj. La riĉaj ekspluatis la malriĉajn kaj en la kamparo la malespero estis la plej granda. En la plej multinfanaj familioj, en la plenplenaj dometoj konekse kun la grandaj bienoj ĉirkaŭe, la vojaĝemo kaj la espero pri alia vivo eble estis la plej granda. Multaj vidis la grandajn elmigrantajn oficejojn en la urbegoj kiel eblecon.

"Sillgatan" en Gotenburgo estis neniu escepto. Tie ekzistis elmigranta oficejo, hoteloj, ĉambroj por vojaĝantoj, drinkejoj kafejoj. Estis simpla tasko trovi alkoholon por mildigi la tagan maltrankvilon.

Sur "Sillgatan" estis homa svarmo, vivo kaj movo de la mateno ĝis la vespero kaj ankaŭ dum la tuta nokto. Oni kun peno tiris bruajn lignajn ĉarojn samtempe kiam la sonoj ĉirkaŭe pleniĝis de ĉiuspecaj dialektoj, smolandaj, halandaj, okcidentaj gotiaj, bohuslandaj kaj oni povis eĉ aŭdi kiel la sveda lingvo miksiĝis kun la usona lingvo.

Granda brukantado aŭdiĝis de la drinkejoj kaj de postiĝantaj uloj kiuj disperdis la tutan vojaĝmonon kaj kuŝis elĵetitaj laŭ la strato. En tiu medio eskaladis la prostituo dum la tempo antaŭ kaj post la centjarŝanĝo.

En la jaro 1895 la nomo "Sillgatan" ŝanĝiĝis al "Postgatan", nomo, kiu laŭ multaj homoj sonoris pli bone. Antaŭ tio, je la jaro 1880 la prostituo havis lokon en la plej noblaj adresoj de Gotenburgo, kie noblaj viroj kun galantaj kutimoj vizitis la establaĵojn. Ofte la bordeloj situis en elegantaj lignaj vilaoj en la belaj ĝardenkvartaloj kiuj situis ĉe "Nya Allén". La agado funkciis ankaŭ kiel speco de socia kunesto inter viroj, kaj multaj komercaj aferoj fariĝis en la medio de peza kaj dolĉa parfumo.



Poste, je la fino de la 19:a jarcento kaj en la spuroj de la elmigrado, malpli elegantaj bordeloj malfermis siajn pordojn. Tie laboristoj kaj internaciaj maristoj estis pli kutimaj vizitantoj, la malsano sifiliso pliiĝis kaj la virinoj kiu estis infektitaj havis la eblecon veni en kuracejojn aŭ ŝpindomojn kie ili havis priskribon de hidrargon. Ili ankaŭ suferis punlaboron pri teksado kaj ŝpinado. Poste, kiam la sufero estis finita, la faroj sur la stratoj rekomencis. Ĉar la virinoj ne povis havi ordinarajn laborojn, la strato estis la sola solvo.

Kontrolejoj startis, kie doktoroj inspektis la publikulinojn du fojojn semajne. Putino kiu ne subordiĝis estis devigita pagi kvin talerojn kiel punon. La elmetito estis granda kaj estis ne nur sur "Sillgatan" ke la prostituo okazis,



ankaŭ "Ekelundsgatan" estis ligita kun prostituado.

Tial, la direkcio en Gotenburgo batalis por plibonigi la situacion kaj oni rigardis la viktorianan Anglujon kiel modelon, sed spite al tio, oldaj protokoloj montras malfeliĉajn vivojn de putinoj. La socialaj fendegoj kreskis.

Daŭris longe, ĝis la 1930:a jardeko, antaŭ ol oni povis rigardi "Sillgatan" aŭ "Postgatan" kiel tute ordinarajn stratojn en la Gotenbarga "Nordstan".

Estas lunĉopaŭso kiam mi promenas en tiuj domblokoj hodiaŭ: "Kronhuset", "Ostindiska

huset", "Christinæ kyrka", kaj la domo de Niclas Sahlgren laŭ la Havena strato.

Imagu kiel bone la plejmulto vivas hodiaŭ! Mi renkontis gajajn homojn kiuj estis bone vestitaj, junaj kaj oldaj. Sed la problemoj restas, kaj en Gotenburgo kaj en aliaj urboj.

Kial ni ne respektu unu la alian? Tre grava demando! Multaj vivas sub malfacilaj kondiĉoj kaj batalas kun la problemoj, kaj tiam kaj nun.

/Ingegerd

## Esperanto sur la strando en Pollando estis celebrita ankaŭ en 2020



Lucyna raportas:

Finiĝis nia kunveno "Esperanto sur la strando" kaj mi okaze de tio sendas al vi kelkajn fotojn, kiuj pliproksimiĝos al vi nian grupon.

Tiu ĉi jaron ni vizitis 3 urbojn, kompreneble Gdansko, Sopoto, kaj estis unu novaĵo: Ni vizitis la urbon Pelplin (50 km de Gdansko) kie

en muzeo estas originala biblio de Gutenberg. Tiun ĉi jaron ni rakontis pri niaj najbaroj Kocevianoj kaj Kaŝuboj. Pasintjare vi vidis originalan kaŝuban vestaĵon kaj nun sur la foto estas vestaĵo de Kocievio. Dum nia restado en Pelplin estis festo de tiu urbo, do estis vere agrable vidi tiun feston.

Mi kore salutas vin, ĉiuj Svedoj!

Lucyna





## Ĉu indas prepari aranĝon dum la epidemio?

demandas al si Paulina Jot, la prezidanto de "Torento", Pola triurba Esperanto-Societo.

La unua dubo estis – ĉu eblas? Kiam la registaro iom post iom reduktis la limigojn, kaj jam estis klare, ke eblas kunveni en pli malgrandaj grupoj, aperis la dua dubo – ĉu iu venos?

La ĉefa temo de la aranĝo, laŭ nia opinio, estis vere interesa, kaj la preparokvanto ne povis simple dissolviĝi.

Ni decidis daŭrigi: "se neniu venos, ni festos mem, kaj ni faros filmon de nia evento".

Meze de aŭgusto aperis timemaj demandoj el Pollando kaj eksterlando: "ĉu mi povas aliĝi?", "Ĉu mi ne estos la sola en la gastejo?"

Fine, estis specifaj aliĝoj.

Dume montriĝis, ke ne okazos la tradicia parado de neregistritaj organizaĵoj en Sopot – "nu, ni elpensos ion".

Do ni preparis nian programon tiel, ke plej multaj agadoj okazis ekstere. La vetero estis perfekta por ni. Estas vere, ke la ĉi-jara programo estis malpli koncentrita, sed ĝi ankaŭ permesis al niaj gastoj malkovri la Tri-Urbon "laŭ sia maniero".

Kiaj estas miaj konkludoj post la aranĝo? Kiel ĉiujare, mi malkovris mirindan ag-energion inter niaj klubanoj. Ĉiuj akceptis iun parton de la taskoj kaj kune ni kreis valoran eventon.



Mi lernis ion novan pri nia najbaraĵo kaj renkontis novajn homojn.

Se ni ĵus restus hejme, ĉio ĉi ne okazus.

*Paulina Jaworska*

Triurba Esperantista Asocio – pensoj post la aranĝo: "Esperanto sur la strando"

[www.esperanto-sopot.pl](http://www.esperanto-sopot.pl)

Mi bondeziras al vi agrablan aŭtunon.

*Paulina*

*Aldono: Vi kiuj iam vizitis la tri urbojn...*

*rigardu la filmon! Vi rekonos niajn geamikojn:*

*Andreo, kiu faris la filmon, Jagoda, Elwira, Lucyna, Paulina, Janek, Vida (el Litovio) kaj aliajn. Svedoj ankaŭ troviĝas sur la filmo.*

*Rigardu! /Siv*

## Novaĵoj el Gdansko

**Elwira Twardowska:**

Feliĉe, ke estas Ora Ĵurnalo! Dank' al ĝi almenaŭ de tempo al tempo mi kun plezuro esperantiĝas. Feliĉe, ke vi ĉiuj estas sanaj kaj daŭre agas.

Priskriboj de la parkoj estas tre agrablaj. Tio instigis min trarigardi fotojn, kiujn mi faris, kiam vi montris tiujn belajn ĝardenojn dum nia unua restado en Gotenburgo.



Pri Esperanto sur la strando” certe jam vi scias de Paulina aŭ Lucia. Mi ne povis partopreni ĝin, sed mi aŭdis, ke estis sukcesa. Mi esperas, ke jam finiĝos ĉiuj sanproblemoj, kiuj trafis mian familion ĉijare kaj mi rehavos emon kaj forton por ĉio. Ĉi somere mi troigis kun kreskaĵoj sur mia balkono. Ĝi aspektas kiel ĝangalo. Ĉiuj kreskaĵoj devis elbatali sian

lokon. Sukcesaj en batalado estis malgrandaj tomatoj.

Verŝajne hodiaŭ finiĝis la somero – pluvas kaj estas malvarme. Post tiom da varmegaj tagoj agrable estas senti pluvon.

Amike  
Elvira



## Jönköping – Daniel Viberg informas pri sia hejmurbo ĉe la lago Vättern

Antaŭ la nomo Jönköping, ĉi tiu urbo nomiĝis Junebäck. La signifo de tiu nomo estas ”La eterna rivereto”. La nomo ŝanĝiĝis al Jönköping, kun la multe uzata finaĵo köping, kiam la urbo iĝis grava vendoplaco por la multaj urbetoj en la ĉirkaŭaĵo de la urbo.

Ankaŭ nun la urbo estas grava loko, sed ne kiel vendoplaco. Dank’ al la centra loko en nia lando, Jönköping nun estas grava loĝistika loko. Multe da grandaj skandinavaj komercoj konstruas siajn varstokejojn en Jönköping. Tre utilas por la

komercoj, ke la urbo troviĝas en la mezo inter Oslo, Kopenhago kaj Stokholmo. La urbo tre fieras pri sia rolo kiel bantpunkto de la tuta Skandinavio.



Antaŭ multaj jaroj troviĝis esperanta grupo en Jönköping, sed nun la grupo estas ŝajne dormanta. Mi komencis studi esperanton antaŭ du jaroj kaj volas vekti la grupon

denove. Se vi loĝas proksime de Jönköping, aŭ konas esperantistojn en la areo, bonvolu kontakti min retroŝte per la adreso [danielviberg@protonmail.com](mailto:danielviberg@protonmail.com).

## ILEI.se – raporto pri tritaga kurso en Mullsjö 3–5 aŭgusto 2007



(ILEI = Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj)

*Ĵurnalisto de Jönköpings-Posten fotis 21 personojn (mankis 8) antaŭ la ĉina domo en Marston Hill, Mullsjö. La plej alta viro estas Jens Allwood.*

Kiel en la pasinta jaro ILEI-se aranĝis Esperanto-kursojn en Mullsjö, ĉi tiun fojon kune kun la studronda asocio BILDA, Jönköping.

Venis 29 personoj. Bertil Nilsson, la dua de dekstre sur la foto, instruis la komencantojn (kaj kelkajn komencintojn). Magnus Henoch, Carl Mäsak kaj mi provis inspiri la jam bone parolantajn partoprenantojn al diskutoj.

Oni elektis diversajn temojn. Grupo inter la du ekstretoj ne troviĝis ĉi tiun fojon.

La kuiristo Peter Bankholm kune kun Aino Åberg prizorgis la manĝaĵon kaj por vegetaranoj kaj por ne-vegetaranoj. Ĉiuj

laŭdis la bongustajn pladojn. Nur fervora kafotrinkanto plendis ke la kafopaŭzoj neoftis.

Du vesperojn Bertil Nilsson prelegis pri la Esperanto-historio en sia absorba modo. Li ricevis multajn demandojn kaj estis malfacile esti akurata pri la tempo.

Ni ankaŭ havis tempon por matena gimnastiko, liniodanco, poenta promeno, "mingla promeno" (komencanto kune kun sperta parolanto). La komencantoj jam iom lernis paroli pri ĉiutagaj aferoj.

**lomete pri la kursvilaĝo:** Troviĝas 11 domoj, kelkaj grandaj, kelkaj malgrandaj. La



kursvilaĝo estis fondita en 1924 de **Charles Allwood**, avo de la nuna posedanto **Jens Allwood**, kiu ankaŭ partoprenis en la kurso. Marston Hill vere estas granda kulturcentro kun influoj de la tuta mondo. La domoj aspektas diverse – hinda domo, ĉina domo, skota ŝtona domo sed ankaŭ ruĝaj lignaj sveddezajnitaj domoj.

Dum la 20-a jarcento multaj instruistoj ĉeestis kursojn en Marston Hill por havigi al si la kompetentecon instrui pri la angla.

Ankaŭ du etinfanoj "partoprenis". Loke, baldaŭ 3-jara, kaj Odin, 1½-jara, amuzis nin kaj aldonis kroman spicon al la jam bona etoso. Ĝis la venonta aŭgusto 2008!

Siv Burell

*La supran tekston Birgitta Anevik trovis interrete. Vi vidas ŝin sur la foto (vestita en blua jak). Mi eraris pri la jaroj kaj pri la aranĝa respondeco. Estis ja ILEI, ne la gotenburga klubo, kiu aranĝis la kursojn, almenaŭ tiun de 2007. Dankon, Birgitta!*

### **Iomete pli pri Marston Hill:**

Tradicie Marston Hill en Mullsjö, proksime al Jönköping, estis angla centro. En 1924 la gepatroj de Martin Allwood en sia terposedaĵo Marston Hill fondis anglan edukan centron.

Kun la tempo la agado evoluiĝis en pli internacian kaj akademian direkton kun lingvopedagogoj, sociologoj kaj akademianoj de aliaj landoj.

Ĝis 1991 troviĝis somera lernejo pri la angla por svedaj gejunuloj laŭ la t.n. "rekta metodo", kiun Martin Allwood importis al Svedio. La centro ankaŭ ampleksis studojn pri angla literaturo, kulturo, teatraĵoj, arto kaj sportoj. Diversaj seminarioj estis aranĝitaj.

Dum la 1950a jardeko estis ĉiun someron aranĝita **la Eŭropo-semajno**.

Fine de la 1950a jardeko Martin Allwood kreis "**Three ways of life**". Usonaj studentoj

per studvizitoj konatiĝis kun Svedio kaj Sovet-Unio. Estis kontaktoj kun aŭtoritatoj kaj entreprenoj en la respektivaj landoj.

Kiel vi jam scias, en Marston Hill multaj instruistoj ricevis siajn atestojn por havi la rajton instrui pri la angla en bazaj lernejoj. Kiel helpo ankaŭ estis radiaj anglaj elsendoj.

Mi men trapasis tian ekzamenon, ne en Mullsjö, sed en Vimmerby. Mi memoras la multajn anglajn librojn, kiujn ni antaŭe devis tralegi. Mi ankaŭ memoras la diskuton ĉu infanlibro kiel Winnie la Puh povus troviĝi inter ili. Mi pensas ke la respondo estis jes.

Mi ne memoras kiel ni en Gotenburgo unue havis kontakton kun la nuna posedanto, **Jens Allwood**, unu el la du filoj de Martin Allwood. Mi mem studis lingvistikon en kurso kune kun sep surdaj personoj en la gotenburga universitato, en kiu Jens Allwood estis unu el la prelegantoj (kun helpo de surdlingvaj interpretistoj).

Mi ankaŭ memoras ke E@I havis seminarion pri esperanto en Gotenburgo kaj Jens estis invitita al la okazaĵo. Li estis la sola neesperantisto. Ulla Luin sidis apud li, interpretante. Eble estis Hokan Lundberg, kiu gvidis la seminarion.

Dum la someroj 2006 kaj 2007 ja estis kursoj, aranĝitaj de gotenburganoj. Partoprenantoj venis de diversaj partoj de Svedio. Mi ne memoras ke iam pluvis dum nia restado. Se vi, kiuj partoprenis en Marston Hill, havas memorojn, bv. rakonti al Ora Ĵurnalo! /Siv



*Aino kaj Jens en la kuirejo.*



# JOHN BAUER, svedo, kiu pentris la etoson de la magiaj arbaroj ĉirkaŭ Jönköping

John Bauer naskiĝis en Jönköping en 1882. Je tia tempo la urboj estis malgrandaj kaj la arbaroj grandaj.

Plaĉis al John vagi en la arbaroj. Li plukis en siajn poŝojn: florojn, muskon, strangaspektajn ŝtonojn kaj stangetojn, kiujn li hejme desegnis.

En la profundaj arbaroj loĝis la troloj. Ili estis brunaj kaj verdaj kiel la arbaro mem. Granda ŝtono kun musko povus esti la kurba dorso de trolo.

16-jara li finis la lernejon kaj transloĝiĝis al Stokholmo, kaj tie li eniris pentrolernejon.

Baldaŭ oni povis vidi desegnojn de John Bauer en gazetoj kaj kiam li havis 19 jarojn li ilustris siajn unuajn fabelojn.

John vojaĝis al diversaj landoj, pentris kaj fariĝis pli sperta pentristo. Li edziĝis al kurskamarado, kiu nomiĝis Ester. Ili ekloĝis en domon ĉe la lago Bunn en Smolando.

Estis ŝi, kiu pozis kiel modelo por preskaŭ ĉiuj liaj bildoj de fabelaj princinoj.



Oni multe laŭdis John pro siaj fabelaj pentraĵoj, sed tamen li sentis sin malaplomba kaj ofte deprimita. Li imagis ke homoj malŝate rigardis de alte pentriston, kiu nur pentris fabelojn.


Tial li intencis transloĝiĝi de Smolando al Stokholmo. Lia edzino ja ankaŭ pentris kaj en Stokholmo ambaŭ havus eblecon evoluiĝi kaj tie John finus pentri trolojn.

Vespere la 22:an de novembro en 1918 ili enŝipiĝis sur "Per Brahe" en Gränna kune kun sia tri-jara filo. La ŝipo havis pezan ŝarĝon – kudromaŝinojn de Huskvarna kaj bokalojn da fruktarmelado de Gränna. Ŝtormegis, sed tamen la ŝipo komencis la vojaĝon kaj direktis sin norden sur la lago Vättern.

Ili neniam atingis havenon. En la malhela nokto en la forta vento la ŝipo renversiĝis kaj iris al la fundo de la lago. Ĉiuj dronis.

Kelkaj personoj interpretis la katastrofon tiel, ke estis la troloj kiuj volis reteni John Bauer en Smolando kaj per helpo de la nikso ili sukcesis.





## Thomas MANN (1875–1955)

Monica sendis la tekston.

Thomas Mann naskiĝis la 6-an de junio 1875 en Lübeck kaj li mortis la 12-an de aŭgusto 1955 en Zuriko. Li edzinigis en 1905 kun Katharina "Katja" Pringsheim.

Thomas Mann same kiel lia patro estis luterano, lia patrino estis katoliko sed lia edzino ricevis la judan religion el tre intelekta familio. Ili kune havis ses infanojn.

Thomas Mann rifuĝis pro nazismo al Svislando en 1933 kaj al Usono en 1938. Li revenis al Svislando en 1952. Liaj libroj estis bruligitaj diversloke en nazia Germanio dum 1933.

Thomas Mann verkis eseojn, romanojn kaj novelojn. Lia unua romano estis Buddenbrooks (1901). La libro estas membiografio pri familia ekesto kaj malesto. La libro estis lia akiro de renomo, pro tiu libro

li havis rekonon kiel verkisto.

Aliaj libroj de Thomas Mann estas La Magia Monto (svede Bergtagen), Joseph kaj liaj fratoj, Doktor Faustus.

Li ankaŭ verkis la tri novelojn Tristan (1903), Tonio Kröger (1903) kaj La Morto en Venecio (1911).

Thomas Mann ricevis la Nobel-premion en 1929 pro la libro Buddenbrooks.

Li vizitis sian naskiĝlokon Lübeck lastfoje en 1955. Je tiu vizito li estis nomita honora civitano. Li mortis en Zuriko en aŭgusto 1955.

El Vikipedio

## Blanka pigo ĉe Sä gengatan, Hisingen. Jan Hellström fotis ĝin.





# Jan Hellström donas al ni novan naturpromenon

En 24 septembro fariĝis promeno de suda Lödöse ĝis Älvängen je 7,5 km sur gruzvojoj laŭlonge de la fervojo preter Alvhem kaj preter la lago de Haj kaj poste de la monto de Örnäs sur malnova fervojtaluso ĝis Älvängen.

La fervoja relparto Göteborg – Trollhättan malfermiĝis en 1877. La ĉefa fervojlinio de BJ (Bergslagernas Järnvägar) de Gotenburgo ĝis Falun kiu ampleksas tiun distancon, pretiĝis en 1879.

En 1919 fondiĝis GDG (Trafikförvaltningen Göteborg–Dalarne–Gävle). La relvojo al Lilla Edet pli poste konektiĝis kun BJ. Nuntempe ĝi nur havas vartrafikon. Ni transiris tiun vartrafikvojon komence de la promeno.

SJ (Statens Järnvägar) transprenis la trafikon de BJ en 1948. Dum la tempo 2004–2012 la parto Gotenburgo – Öxnered alkonstruiĝis en duoblarelojn. Tiel oni liberigis tiun fervojtaluson, sur kiu ni hieraŭ iris.

Sufiĉe multaj rabobirdoj estis vidataj: marĉa cirkuo, buteo, ruĝa milvo, turfalko kaj alaŭdfalko.

La lago de Haj ofertis platbegan anason, kerkedulon kaj montarmotacilo.

Greno estis rikoltata sur la kampoj. Ne malmultaj birdetoj en la aero, kiel herbejpipio, kampalaŭdo kaj kanemberizo.

Anseroj sur la kampoj!

Dum la kafumpaŭzo ĉe banejo apud rivero Göta Älv flugis kelkaj ridmevoj suben



laŭlonge de la rivero. De la malnova fervojtaluso ni povis explore observi la grandan insulon Tjurholmen kun bieno meze en Göta Älv.

/ Jan Hellström

## Pri la gazeto "Faktum"

Faktum estas magazino, kiun nur senhejmaj personoj rajtas vendi. Ili gajnas duonon de la prezo de ĉiu vendita ekzemplero.

**La 10a de oktobro estas la tago de senhejmuloj.** Sur la paĝo "Opinio" en la oktobra Faktum, Sara Britz, la redaktoro, bedaŭras ke ekzistas iu tia tago. La internacia tago de senhejmuloj ne devas ekzisti. Havi hejmon estas homa rajto! Anstataŭ tiun tagon ni bezonas politikistojn, kiuj komprenas ke sen propra hejmo ne eblas havi bonan vivon.



Sara Britz



En EU mankas hejmo al 700 000 homoj. Dum la pasintaj dek jaroj la nombro de senhejmaj homoj kreskis je 79 procentoj.

Strange, sed pro la korona-pandemio, ĉi tiun someron, ilia situacio iomete pliboniĝis, ĉar troviĝas ja neokupitaj hotelĉambroj.

Ekzistas do kelkaj helpunktoj! En Lyono ekz. organizoj de Nederlando, Portugalio kaj Wales kunlaboras por krei konstantajn loĝejojn. En Lyono oni deklamis nultoleremon kontraŭ senhejmeco. **Feantsa** estas organizo kiu kunigas projektojn por batali kontraŭ senhejmeco.

Sara Britz diras DANKON al tiuj, kiuj aĉetas FAKTUM.

## Pri krimoj kaj prizonoj en Svedio

Birgitta Anevik skribas:

Parolante pri troplenaj prizonoj en Svedio... rimarku ke la nombro de loĝantoj en 2017 estis konsiderinde pli granda ol en 1967. Jen eta statistiko de la magazino **Paraŝraf** koncerne la nombron de personoj en malliberejo:

1967 – **5511**, 1987 – **4177**, 1997 – **4066**, 2007 – **5275**, 2017 – **4000**.






**Mi aldonas:** Felepe Estrada Dörner estas profesoro pri kriminologio kun krimdisvastiĝo kiel unu el siaj specialaj fakoj. Li skribas en la revuo "Nu": "La raporto de la gazetaro kaj aliaj medioj donas grandan spacon al sensaciaj krimoj. Tio povas krei falsan bildon pri la tipo de krimoj kaj la frekvenco".

Li konstatas ke la krimoj fariĝis pli maloftaj, sed ke kelkaj fariĝis pli krudaj. Fakte ni havis pli altajn nivelojn de mortigo popersone en la 1990a jardeko ol nun.

La krimeco malkreskis ĉie en Eŭropo post la 1990a jardeko. Sur skalo Svedio estas en la

<https://www.magasinetparagraf.se/nyheter/kronikor/201719-ett-exempel-pa-klanbrottslighet>



*Komparoj inter landoj pri la relativa nombro de murdoj en 2018*

mezo. Finnlando havas pliajn, kune kun la Baltaj landoj. Danio kune kun Pollando, Nederlando kaj Germanio havas malpliajn krimojn ol Svedio.

Klan-krimeco troviĝas en la plej grandaj urboj. Maltrankvile estas ke klankondukantoj povas esti membroj de la politika kaj komerca vivsektorj.

**Paraŝrafo** nun estas la plej granda gazeto pri krimoj. "Advokatoj sen limoj" estas ĝia karakteriza trajto. Oni volas societeton sen krimoj. Tamen kelkaj el la gazetistoj fakte mem estas aŭ estis krimuloj. /Siv

## Punoj por esperantistoj. De Neil Blonstein, Facebook



# La ekstrema pruvo de matureco

estas povi ignori la gramatikajn erarojn de aliaj homoj.

Claudio Santos

Drinku kaj Lenu Esperanton

Ŭtersta beviset pŕ magnad  
"ar att kunna ignorera andra  
mŕnniskors grammatiska fel



facebook.com/herregudco





# Stokholmo havas restoracion kun esperanta nomo:

## Fandado fd.Två Grabbar

Inga sendis la informon.



À la carte

### MALGRANDAJ PLADOJ EL LA TUTA MONDO

Ĉiuj estas malgrandaj, do ni rekomendas ke vi prenu po 3–4 pladojn per persono.

(Hmmm oni devas havi dikan biletujon.

*Mia komento – Siv)*



#### FUNGAJ KROKEDOJ 75 KR

Pankofriterade kroketter gjorda på potatis och Karl-Johansvamp.

#### SUPO DE TERPIRO KUN TRUFOJ 110 KR

Jordärtskockssoppa med havregrädde, vitt vin och tryffel.

#### SUDA FRITITA KOKIDO 95 KR

Southern fried chicken med hot sauce, citron och saltgurka.

#### SIMFONIO DE BETOJ 115 KR

Symfoni av betor med chèvrecrème, brynt smör och hasselnöt

#### KRADROSTITA PORKAĴO GOUCHUJANG 135 KR

Grillad fläksida från Stommens Gård med Gouchujang, kimchi och krispig sallat.

#### TAKOJ KUN KONFITA ANASAĴO 125 KR

Mjuka tacos med ank-confit, grillad salsa och silverlök.

#### TINUSO TATAKITA 125 KR

Tonfisktataki med örtsallad, Nouc Cham, Pomelo, Cashewnötter och kokos.

#### TRUFAJ ASPARAGOJ 120 KR

Grillad grön sparris tryffelmajonnäs och riven parmesan.

#### KRADROSTITA FLANKA STEKAĴO 140 KR

Grillad flankstek med Chimichurri, Mojo rojo och Pimentos de Padrón.

#### PORKAĴO HUNTUNO 95 KR

Wontons fyllda med fläsk, pak choi, ingefära och Sichuanpeppar. Finns även vegan-alternativ.

**BUTERE BAKITA FLORBRASIKO 95 KR**

Smörbakad blomkål med svart tryffel, lökringar och blomkålscrème.

**MALGRANDAJ HAMBURGEROJ 95 KR**

Slider (miniburgare) med kimchi, saltgurka, cheddar, picklad

rödlök och majonnäs på röd olja.

**TAKO KUN PROFUNDE FRITITAJ FABOJ 95 KR**

Mjuka tacos med bönfritters, grillad salsa och avokadocrème.

**MALDIKA BOVAFILEO 115 KR**

Klassisk liten carpaccio på oxfilé med spenat, parmesan och tryffelcrème

**KAVIARO DE KALIX 125 KR/ST**

Råraka i tacoformat med smetana, rödlök och Kalixlöjrom. Säljes styckvis.

**SPIKA KUKUMA SALATO 65 KR**

Gurksallad med svart vinäger, röd olja, jordnötter och koriander.

**SALVELENO VAPORITA 135 KR**

Ångad röding med smörstekt svamp, picklad svartrot, brynt smör och friterad grönkål.

**KVIN AROMAJ ANASBRUSTAJOJ 145 KR**

Rosastekt ankbröst med lotusrot, five spice, sjökorall och soja-, yuzu- och chiliglacé.

**MARFRUKTOJ KUN FLORBRASIKO 135 KR**

Halstrad pilgrimsmussla med blomkålscrème, gurka och yuzu.

**SALMAJO TATARO 125 KR**

Laxtartar med wasabicrème, wakame-sallad och mandusås.

**ĈEFELEKTO 565 KR/PP**

Kockens urval av 4 rätter plus dessert.

Serveras till samtliga vid bordet.

**TRINKPAKAJON**

Dryckespaket med 5 utvalda glas 425 KR / PP

## Esperantaj vortoj en la komerca mondo

### Ekz. Mirinda

Botelo en Niĝerio de Mirinda de oranĝo.

Mirinda estas marko de limonada refreŝiga trinkaĵo origine kreita en Hispanio. La nomo devenas el Esperanto kaj estas asertoj, ke la originala posedanto estis individua esperantisto. Ĝi havas fruktodiversecojn inkluzive de gustoj je oranĝo, vinbero, pomo, frago, frambo, ananaso, banano, granato, citrono, hibisko kaj grapfrukto. La oranĝa gusto de Mirinda reprezentas la plimulton de Mirinda vendo tutmonde.

En 1970 la usona konzerno PepsiCo aĉetis la markon Mirinda kaj komercigas ĝin unuavice ekster Nordameriko. Kiel aliaj refreŝigaj trinkaĵoj, Mirinda estas havebla en multoblaj

formuliĝoj dependantaj de la gusto de individuaj merkatoj. Ĝi estas grava marko en Ĉinio, Sud-Orienta Azio, Mezoriento kaj Sudameriko.







Ela la retpaĝo de Neil Blonstein: **Bistro Esperanto**.

**Kalkulado** – Financaj servoj en Pollando.


**Ĉu ĉe vi troviĝas entreprenoj kun esperantaj vortoj? Rakontu!**



## Horoskopo – la nunaj datumoj ne estas la ĝustaj

Roger Nilsson skribas:

Horoskopo indikas en kiu stela konstelacio la suno troviĝis, kiam vi naskiĝis, sed vere la suno troviĝis en tute alia stela konstelacio ol en kiu oni antaŭe tradicie pensis. Malsupre vi povas vidi en kiu el la 13 (!) monatoj vi vere naskiĝis.



Namn	Symbol	Stjärnbild	I horoskopet	I verkliĝheten	Element
Stenbocken (Capricornus)	Stenbocken	Stenbocken	22 dec – 20 jan	20 jan – 15 feb	Tero
Vattumannen (Aquarius)	Vattumannen	Vattumannen	21 jan – 19 feb	16 feb – 10 mar	Aero
Fiskarna (Pisces)	Fiskarna	Fiskarna	20 feb – 20 mar	11 mar – 17 apr	Akvo
Väduren (Aries)	Väduren	Väduren	21 mar – 20 apr	18 apr – 12 maj	Fajro
Oxen (Taurus)	Oxen	Oxen	21 apr – 21 maj	13 maj – 20 jun	Tero
Tvillingarna (Gemini)	Tvillingarna	Tvillingarna	22 maj – 21 jun	21 jun – 19 jul	Aero
Kräftan (Cancer)	Kräftan	Kräftan	22 jun – 22 jul	20 jul – 9 aug	Akvo
Lejonet (Leo)	Lejonet	Lejonet	23 jul – 22 aug	10 aug – 15 sep	Fajro
Jungfrun (Virgo)	Jungfrun	Jungfrun	23 aug – 23 sep	16 sep – 29 okt	Tero
Vågen (Libra)	Vågen	Vågen	24 sep – 23 okt	30 okt – 22 nov	Aero
Skorpionen (Scorpius)	Skorpionen	Skorpionen	23 okt – 22 nov	23 nov – 28 nov	Akvo

Ormbäraren (Ophiuchus)	Ormbäraren	Ormbäraren		29 nov – 16 dec	Elementio
Skytten (Sagittarius)	Skytten	Skytten	23 nov – 22 dec	17 dec – 19 jan	Fajro

Ormbäraren, la Serpentportanto, estas stelkonstelacio, kiu aperigis, kiam oni komencis paroli pri stelkonstelacioj, kiuj estis konataj dum kelkaj miloj da jaroj. Ĉar la suno troviĝas en tiu konstelacio dum tre mallonga tempo, oni forprenis ĝin el la zodiako.

Angle oni nomas ĝin Ophiuchus, Serpent Bearer aŭ Serpentarius.

La konstelacio ampleksas tiun stelon, kiu estas al ni la plej proksima stelo – krom unu – sur la tuta ĉielo. Estas la stelo de Barnard en la distanco de ses lumjaroj. La konstelacio troviĝas vid’ al vide de la Orio kaj nordokcidente de la centro de la Lakta Vojo.

Se oni elektas kredi je la novaj teorioj, oni estas naskita en la stela figuro de la Serpentportanto, se oni naskiĝis inter la 29an de novembro kaj la 16an de decembro.

Multaj pridubas ĉu oni enlasu 13an stelbildon en la antaŭe dividebla nombro.

En 2007 sveda satelito nomata Odin trovis nubon de molekulara oksigeno en la spaco. La signaloj registriĝis precize de la areo, kie troviĝas la Serpentportanto.

### La ecoj de la Serpentportanto

La serpentportanto serĉas saĝon kaj konon kaj volas fariĝi aŭtoritato en specifikaj fakoj.

Ri ne estas aparte mallaŭta aŭ malaltfluga, sed preferas la grandiozon, eĉ la pompan.

Serpentportanta persono estas revulo, sed kontraŭe al multaj aliaj, ri scias kiel realigi la revojn.

Serpentportanto havas grandan fortunon kaj altan moralon. Ties kreco kaj inventemo neniam ĉesas mirigi. Se tiu persono ne estas malĝuste taksata, ri estos levata al la ĉielo, iu mezo ofte ne troviĝas. Bedaŭrinde la Serpentportanto ofte estas celo de envio.

/Roger



Kiam estas plenluno mi ofte maldormas. Mi konas kelkajn personojn, kiuj ankaŭ observis tiun fenomenon. Kiel pri vi? /Siv



# Pri nova planedo kiu ĉirkaŭas la stelon Aniaro

Roger sciigas nin:

En 2019 ĉiuj landoj povis decidi pri la nomo de planedo kaj la nomo de tiu stelo, ĉirka kiu ĝi ĉirkaŭas.

Svedio elektis la nomon Aniaro laŭ la spacepopeo de Harry Martinsson. (Alia imagebla alternativo povus esti Zarah ("Vill ni se en stjärna, se på mig").)

La stelo troviĝas en la stelkonstelacio la Granda Ursino, tuj sude de la Granda Urso,

sed estas postulata almenaŭ kampobinoklo por vidi ĝin. Antaŭe la stelo havis nur katalogan numeron (HD102956).

La nomo de la ekzoplanedo estas Isagel, kaj ĝi estas la sola ĝis nun esplorita, kiu ĉirkaŭas Aniaron.

Malsupre estas tabelo, kiu montras la nomojn de la steloj kaj ties ekzoplanedoj de niaj najbaraj landoj.

Lando	Stelo	Planedo	Klarigo
Danio	Muspelheim	Surt	Muspelheim estas la mondo de la fajro en la nordia mitologio. Fajretoj de tiu kreis la sunon, la lunon kaj la stelojn. Surt estis la giganto, kiu regis super la fajrogigantoj en Muspelheim, la filoj de Muspel.
Estonio	Kolt	Hämarik	Kolt estas la estona por tagiĝo kaj Hämarik signifas krepusko.
Finnlando	Horna	Hiisi	Horna estas la infero en finna mitologio. Hiisi povas esti diversaj malbonaj estaĵoj, kiel troloj, gigantoj aŭ diversaj tipoj de spiritoj kiuj kun la tempo estis rigardataj malbonaj estaĵoj.
Islando	Funi	Fold	Funi estas malnova islanda vorto por fajro aŭ brulego kaj Fold signifas teron aŭ grundon . La vortoj estas prenitaj de islandaj vortoj el la klasikaj elementoj.
Latvio	Liesma	Staburags	Lisma kaj Staburags estas roluloj en la latva poemo Staburags un Liesma. Liesma signifas flamon kaj Staburags estas mitampla roko.
Litovio	Taika	Vytis	Taika signifas pacon kaj Vytis estas la ŝtata blazono de Litovio kaj unu el la plej malnovaj blasonŝildoj de Litovio.
Norvegio	Násti	Albmi	Násti estas samea vorto por stelo kaj lmbi estas la samea por ĉielo.
Pollando	Solaris	Pirx	Solaris estas la nomo de pola science fikcia libro de Stanisław Lem, ankaŭ filmita, kie Solaris estas planedo kovrita de maro. Pirx estas piloto, ofte estanta karaktero en la aliaj libroj de Stanisławs .
Svedio	Aniara	Isagel	Aniara estas la nomo de la ŝipo kiu devojiĝas en la spaco laŭ la spacepopeo de Harry Martinsson kaj Isagel estas la piloto de la ŝipo.

# Ni en Skandinavio de Willy Breinholst

Ilustris: Léon van Roy; Tradukis el la dana: F. Szilágyi kaj Regina Emson.

Mi prenis partojn de la teksto. Jen ĝi:

”La skandinavoj devenas de la vikingoj. Tiuj havis longan, densan barbon kun bierŝaŭmo ĉe la pinto kaj havis klaran praktikon bruligi anglosaksajn vilaĝojn kaj forrabi krietajn junajn knabinojn.


Pro sufiĉe da ermenoj Danlando, Norvegujo kaj Svedlando estas reĝlandoj.



## La plej dense loĝata parto de Norvegio

La norvegaj knabinoj, kiujn oni nomas ”jenter” estas la plej ĉarmaj en la mondo.

La plej populara norvega veturilo estas la aŭtobuso, kaj ĉar la montegaraj vojoj ne malofte estas pli larĝaj ol la busoj, tio estas la plej sekura maniero atingi iun lokon en Norvegujo. Se oni ververe ne preferas grimpi.



**Danlando** povas fieri nur pri unu monto. Ĝi estas 157,5 m super la surfaco de la maro dum malfluso; ĝin oni nomas – kun ĉarma dana modesto – Ĉielmonto (Himmelbjerg). Oni havas mirindan panoramon de ĝia pinto, se oni staras sur seĝo.

La danaj knabinoj, kiujn oni nomas ”piger” estas la plej ĉarmaj en la mondo.

**Svedlando** estas la plej granda el la skandinaviaj landoj. En Meza Svedlando, kie

la ĉefurbo de la lando situas, vivas la t.n. svedoj, kies kaŭzo estas, ke oni volas ilin havi nek en Skanio, nek en Laponio.

La svedaj knabinoj, kiujn oni nomas ”flickor”, estas la plej ĉarmaj en la mondo.

La bestaro en Skandinavio estas riĉa kaj varia, escepte en Danlando, kie nur ĉevaloj, bovoj kaj porkoj estas konataj. Rezulte de tio, danaj ĉasistoj apenaŭ havas okazon ĉasi.



La skandinavoj estas naturamantoj. Dimanĉe ĉiuj urboj estas kvazaŭ malplenaj. La Osloanoj grimpas al la montoj por kolekti vakciniojn aŭ skii. La Stokholmano forlasas la urbon sen iu esenca celo – temas nur pri tio, ke oni venu tiel malproksimen kiel eble kaj tiel rapide kiel eble.

La Kopenhaganoj procesias al la arbaro kaj tion ili faras kun la unusola atento: Veni ien por ekkuŝi, ekmanĝi la kunportitan manĝopakon.



### La manĝo estas absolute grava detalo de la vivo

La skandinavanoj montras fortan politikan intereson. Ĉiu el ili povas gvidi sian landon pli bone ol la ĉefministro.

Alia elstara karakterizaĵo estas en Skandinavio la honesteco. Nur du formoj de trompo estas konataj: trompo pri la biletprezono en la tramoj, kion oni konsideras kiel specon de sporto, kaj la trompon ĉe la impostdeklaro, kion oni konsideras, kiel oni diras, neceso.

*La verkisto, Willy Breinholst, estis dano, ĵurnalisto kaj verkisto, ĉefe humuristo. Li naskiĝis en 1918. En 1948 li ricevis stipendion danan, destinitan por eminenta humuristo. /Siv*



svedo




norvego



dano

# Esperantaj historietoj...

El la esperantobiblioteko de Stannum



Kiel komplementon al lecionoj oni povas trovi mallongajn tekstojn en "Esperantaj historietoj" de 1935. La dano Peter Frey, kiu kolektis la historietojn, diris: "Mi uzis nur kompreneblajn vortojn kaj frazojn. La historietoj ne estas laŭvorte tradukitaj, sed prilaboritaj al la celo. [...] Se ĉi tiu modeste farita eksperimento povas utili al la novaj Esperantistoj, miaj klopodoj ne estus senfruktaj."



## La ruza pudelo

En gastigejo la viroj ĝenerale kunvenis vespere por diskuti la aferojn de la vilaĝo, Ĉiu el ili plejofte kunprenis siajn hundojn. Laŭ malnova kutimo la hundoj kuŝigis sin ĉirkaŭ la fornon. Sed estis kompatinda pudelo, kiu neniam povis trovi bonan lokon, ĉar ĝia mastro ĉiam malfruiĝis. Jam ofte la pudelo pensis, ĉu ne estas eble aranĝi tion en alia maniero.

Iun malvarman vintran vesperon, kiam ĝia mastro malfruiĝis kiel kutime, ĝi elpensis ruzan planon. Subite ĝi ekstaras, kuras el la

ĉambro kaj post momento oni aŭdis ĝin boji per ĉiuj fortoj en la korto. Kiam la aliaj hundoj aŭdas tion, ili tuj kuregas eksteren por vidi, kio estas. Sed ili trovas nenion rimarkindan. La pudelo nur aranĝis tiun komedion por forlogi la aliajn hundojn for de la bonaj lokoj ĉirkaŭ la forno. Kiam la hundoj revenis al la forno, ili trovis la pudelon kuŝanta apud ĝi.

*Mi elektis unu el la plej mallongaj historietoj. Fakte Peter Frey aranĝis la tekstojn tiel, ke la plej mallongaj estas en la komenco. La lastaj estas tro longaj por Ora Ĵurnalo. /Siv*



El la retpaĝo de Núbia Alves Sobral, Facebook:

Miaj amikoj loĝas en diversaj partoj de la mondo, pro tio mi bezonas uzi iun neŭtralan lingvon.




Everton Linhares

Pro tio mi parolas Esperanton.



Jaro = 12 monatoj



Kanto kun teksto en tri lingvoj – Esperanto, la angla kaj la germana

Inga trovis ĝin:

[https://www.youtube.com/watch?v=ubce\\_R\\_t6bY](https://www.youtube.com/watch?v=ubce_R_t6bY)

## En la fremdujo

laŭ la germana poemo "in der Fremde" de Eichendorff

El la hejmo malantaŭ la fulmoj  
ventego la nubojn alblovas  
Sed patrino kaj patro jam mortis:  
Neniu min tie plu konas.  
**La patrino kaj patro jam mortis:**  
**Neniu min tie plu konas.**

Venas baldaŭ, ah baldaŭ la tempo  
de l' ripozo sub arbara bru'  
en soleco: Kaj ankaŭ ĉi-tie  
neniu konas min plu.  
**En soleco: Kaj ankaŭ ĉi-tie**  
**neniu konas min plu.**

## "Knabineto kun alumetoj"

– parolinte pri Jönköping, "la Alumeta Urbo"

Fabelo de H. C. Andersen  
Tradukita de L. L. Zamenhof



ESTIS TERURE MALVARME; neĝo faladis, kaj fariĝis jam vespero; tio estis la lasta vespero en la jaro, vespero de Silvestro. En tiu malvarmo kaj en tiu mallumo sur la strato iris malgranda malriĉa knabino kun nekovrita kapo kaj nudaj piedoj. Estas vero, ke ŝi havis sur si pantoflojn, kiam ŝi foriris el sia domo; sed tio estis tre grandaj pantofloj, ili antaŭe estis uzataj de ŝia patrino, tiel grandaj ili estis, kaj ilin la knabineto perdis, kiam ŝi rapidis transkuri la straton, kiam du kaleŝoj kun furioza rapideco pretergalopis; unu pantoflon oni plu ne povis trovi, kaj kun la alia forkuris iu knabo, kiu promesis, ke li uzos ĝin kiel lulilon, kiam li iam havos infanojn.

Tiamaniere la malgranda knabino iradis sur la nudaj graciaj piedetoj, kiuj de malvarmo estis tute ruĝaj kaj bluaj. En sia malnova antaŭtuko ŝi portis amason da alumetoj, kaj

unu fasketon ŝi tenis en la mano. En la daŭro de la tuta tago neniu ion aĉetis de ŝi, neniu donis al ŝi almozon. Malsata kaj tremanta de frosto la kompatinda knabineto trenadis sin pluen kaj aspektis jam tute senespera kaj senkuraĝa. La neĝaj flokoj faladis sur ŝiajn longajn blondajn harojn, kiuj en belaj bukloj pendis super sia nuko, sed pri tiu ornamo ŝi certe ne pensis. El ĉiuj fenestroj radiis hela brilo de kandeloj, kaj sur ĉiuj stratoj estis sentata la odoro de bongusta ansera rostaĵo. Estis ja vespero de Silvestro, kaj tiu penso okupis ĉiujn sentojn de la malgranda knabino.

En unu angulo inter du domoj; el kiuj unu iom pli elstaris sur la straton ol la alia, ŝi kaŭre sidiĝis. Ŝiajn malgrandajn piedetojn ŝi subtiris sub sin, ŝi tamen ankoraŭ pli suferis de la frosto, kaj malgraŭ tio ŝi ne kuraĝis iri



hejmen, ĉar ŝi ne vendis ankoraŭ eĉ unu skatoleton da alumetoj, ne ricevis ankoraŭ eĉ unu speson. Ŝi certe ricevus batojn de la patro, kaj malvarme estis ja hejme ankaŭ; ili tie havis super si nur la tegmenton, kaj la vento akre fajfadis internen, kvankam en la plej grandajn fendojn estis en ŝovitaj pajlo kaj ĉifonoj. Ha, kia agrablaĵo estus nun unu alumeto! Se ŝi nur povus kuraĝi elpreni unu el la skatoleto, ekfroti ĝin je la muro kaj varmiĝi al si sur ĝi la fingrojn! Fine la infano elteris unu el la alumetoj. "Riŝ!" kiel ĝi eksplodis, kiel ĝi brulis! La alumeto eligis varman helan flamon, kiel malgranda kandelo, kiam ŝi tenis ĉirkaŭ ĝi sian manetojn. Tio estis mirinda flamo; la malgranda knabino havis la impreson, kvazaŭ ŝi sidas antaŭ granda fera forno kun latunaj fermiloj kaj latunaj ornamaĵoj; la fajro brulis tiel bele kaj varmigus tiel agrable! La knabineto jam etendis siajn piedojn, por varmigi ankaŭ ilin, – tiam la flamo estingiĝis. La forno malaperis, ŝi sidis kun stumpeto de forbrulinta alumeto en la mano. Ŝi ekbruligis alian alumeton, ĝi brulis, ĝi lumis, kaj tiu loko de la muro, sur kiun falis la lumo, fariĝis travidebla kiel gazo. La rigardo de la knabineto penetris rekte en la ĉambron, kie la tablo estis kovrita per blindige blanka tablotuko kaj delikata porcelano kaj sur ĝi plej bonguste vaporis rostita ansero, farĉita per prunoj kaj pomoj. Kaj kio estis ankoraŭ pli ravanta, – la ansero elsaltis el la plado kaj kun forko kaj tranĉilo en sia dorso balanciĝante ekiris sur la planko; ĝi iris ĝuste en la direkto al la malriĉa knabino. Sed la alumeto estingiĝis, kaj oni vidis plue nur la dikan malvarman muron.

Si ekbruligis novan alumeton. Kaj jen la knabineto sidis sub plej belega Kristnaska arbo; ĝi estis ankoraŭ pli granda kaj multe pli riĉe ornamita ol tiu, kiun ŝi en la sankta vespero vidis tra la vitra pordo ĉe la riĉa komercisto. Miloj da kandeloj brulis sur la

verdaj branĉoj, kaj mikskoloraj bildoj, similaj al tiuj, kiuj estis ekspoziciitaj en la fenestroj de la magazenoj, rigardis sur ŝin; la knabineto etendis al ili ambaŭ manojn, tiam la alumeto estingiĝis. La multo da Kristnaskaj kandeloj leviĝis pli kaj pli alten, kaj nur nun ŝi vidis, ke tio estis la helaj steloj. Unu el ili falis malsupren kaj trenis post si tra la ĉielo longan strion de fajro. "Nun iu mortas!" diris la knabineto, ĉar la maljuna avino, kiu sola estis afabla en rilato al ŝi, sed nun jam delonge plu ne vivis, estis dirinta: "Kiam stelo falas, tiam unu animo leviĝas al Dio."

Ŝi frotis denove unu alumeton je la muro; ĝi ĵetis ĉirkaŭ ŝin vastan lumon, kaj en la brilo de ĉi tiu staris la maljuna avino, hele prilumita, milda kaj afabla.

"Avineto!" ekkriis la infano, "ho, prenu min kun vi! Mi scias, ke vi malaperos tuj, kiam la alumeto finiĝos, vi malaperos, kiel la varma forno, la bongusta ansera rostaĵo kaj la granda briletanta Kristnaska arbo!" Rapide ŝi ekbruligis la tutan restaĵon de la alumetoj, kiuj ankoraŭ troviĝis en la skatoleto, ŝi volis reteni la avinon; kaj la alumetoj disvastigis tian brilon, ke estis pli hele ol en luma tago. Tiel granda, tiel bela la avino neniam estis; ŝi prenis la malgrandan knabinon sur sian brakon, kaj ili ekŝvebis alten en brilo kaj ĝojo; malvarmo, malsato kaj timo malaperis, – ili estis ĉe Dio.

Sed en la angulo ĉe la domo en la malvarma matena horo sidis la malgranda knabino kun ruĝaj vangoj, kun rideto ĉirkaŭ la buŝo, – senviva, frostiĝinta en la lasta tago de la jaro. La mateno de la nova jaro leviĝis super la malgranda kadavro, kiu sidis kun la alumetoj, el kiuj preskaŭ unu tuta skatoleto estis forbruligita. "Ŝi volis sin varmigi!" oni diris. Neniu sciis, kion belan ŝi vidis, en kia brilo ŝi kun la maljuna avino eniris en la ĝojon de nova jaro.